

Bosnia Lilio

**GAZETO DE ESPERANTO - LIGO
DE BOSNIO KAJ HERCEGOVINO**

**NUMERO 6 (1/2006)
JARO 6**



62-a IJK POST 33 JAROJ EN SARAJEVO

BOSNIANINO EN LA KORO

SREBRENICA - PARADIGMO DE LA KRIMO

DUM LA SIEĜO

NOVAJ PROJEKTOJ DE ESPERO

BELETRO: MARKO VEŠOVIĆ

SARAJEVANO EL MONTENEGRO

Bosnia Lilio

Gazeto de Esperanto-Ligo
de Bosnio kaj Hercegovino,
n-ro 6 (1/2006) jarkolekto 6/ 2006

Redakta komitato:

Senad Čolić, Mustafa Resulović,
Branko Miljko, Mustafa Tandir,
Kemal Jakupović.

Kovrilpaĝo:

Anoj de la
Loka Kongresa Komitato
de maldekstre sidas

Tarik Šahinović
Anida Čolić
Samir Ribić
Vildana Delalić
Dženita Zvirac
Selma Zvirac
Lejla Bahor
Emir Arnautović

Subtena abonkotizo:

5 EŬROJ (5 KM)

Enlandanoj:

Savez za esperanto BiH
129-101-10002644-89
HVB Central profit banka dd
Sarajevo

Eksterlandanoj:

Pagoj al la kontoj de Universala
Esperanto-Asocio kodnumero
elbh-j

Kunlaboris en tiu ĉi numero:

Françoise Noireau, Azra Čolić,
Samir Ribić; Vildana Delalić,
Fetah Zvirac kaj d-ro Bećir Macić.

Eldonisto

Esperanto-Ligo de Bosnio-Hercegovino
p.f. 452
BA-71000 SARAJEVO
Bosnio-Hercegovino

tel/telefakso + 387 33 646-969
+ 387 33 533-958

retadreso: info@esperanto.ba

TTT paĝo: www.esperanto.ba

BONVENON AL IJK

Post kvin jaroj "Bosnia Lilio" estas denove inter ni. Ĝia vojaĝo tra la mondo ĉi-jare estos pli facila ol kutime. Post tridektri jaroj Sarajevo kaj Bosnio kaj Hercegovino denove gastigos Internacian Junularan Kongreson de TEJO. Vi karaj niaj gastoj el la tuta mondo fariĝos niaj poŝtistoj. Dankon pro tio kaj bonvenon al la 62-a IJK.

Dum la pasintaj kvar jaroj niaj gvidaj membroj "batalis" kun ŝtataj organoj de Bosnio kaj Hercegovino por oficiale registri sur ŝtata nivelo nian organizon. En la jaro 2001 la ŝtata Parlamento akceptis novan leĝon pri asocioj kaj fondusoj en Bosnio kaj Hercegovino. La leĝo ankaŭ difinis procedon por ricevi rajton havi en titolo de sia organizo nomon de Bosnio kaj Hercegovino. La procedo kiu en normalaj kondiĉoj bezonas maksimume du aŭ tri monatojn daŭris pli ol kvar jarojn. Decidon de la Ministerio por justeco de Bosnio kaj Hercegovino nia organizo ricevis antaŭ nelonge. Finfine tio estas pasinteco, sed pro nekredeblaj aferoj ni perdis tempon, multfoje monon, ne sukcesis eldoni ekz. novajn numerojn de la gazeto, lernolibrojn, k.s.

En tiu ĉi numero de la gazeto vi trovos bonvenigon por ĉeestantoj de la kongreso. Tiu evento estas tre grava en la postmilita tempo kaj bona ŝanco por plifortigi kaj plivastigi nian organizon.

Kelkajn paĝojn ni dediĉis al la eterna temo: "Srebrenica." Pasis jam dekunu jaroj post la genocido en Srebrenica, sed plimulton da viktimoj oni ankoraŭ ne identigis kaj oni ne havas eblecon honore entombigi ilin. Oni daŭre malkovras novajn amasajn masakrejojn. La lasta en Kamenica kaŝas

pli ol sescent postmortajn restaĵojn! Hontinde estas ke ĉefaj akuzintoj por la genocido ankoraŭ ne estas arestitaj.

Kiamaniere travivi teruraĵojn en sieĝita Sarajevo estas ankaŭ eterna temo. Atestas pri tio kun multaj notoj el la vivo dum tiu periodo Samir Ribić.

El multaj geesperantistoj kiuj lastatempe vizitis nian landon ni elektis s-ino Françoise Noierau el Francio por prezenti ŝin al niaj legantoj kaj legi pri ŝiaj impresoj pri Bosnio kaj Hercegovino, pri urboj, homoj, niaj kulturoj, historioj, kutimoj k.t.p.

Estas tre interesa por niaj legantoj ĉar Françoise regas sufiĉe bone bosnan lingvon kaj pro tio ŝi havis multajn kontaktojn ankaŭ kun neesperantistoj. .

En urbo Teslić okazis renkontiĝo TAMEN. Partoprenis gejunuloj el eksa Jugoslavio kaj el la tuta Bosnio kaj Hercegovino. Ili konsentis kaj mesaĝis ke ne ekzistas alia vojo ol integriĝo kaj nova kunvivado en Eŭropa Unio.

Nia humanitara organizo ESPERO daŭre laboras. Al legantoj estas prezentitaj novaj projektoj kaj raportoj pri la finitaj en valoro de centdekunu mil eŭroj nur por la akvodukto Klokotnica!

Paĝoj de belarto estas dediĉitaj al Marko Vešović, unika homo, sarajevano el Montenegro, homo kiuj travivis sieĝadon de Sarajevo kaj fariĝis ĝia poeto.

Nia movado perdis plian gravan aktivulon Muhamed Turan. Brava bosno kiu travivis la tutan militon en Banja Luka.

La Redakcio

POST TRIDEKTRI JAROJ

MIRAKLO EN SARAJEVO, 2006

Kiam okazis la 29-a IJK en Sarajevo en la jaro 1973 la tuta etoso kaj cirkonstancoj estis aliaj. Sarajevo estis la ĉefurbo de unu el la ses respublikoj en Jugoslavio, socialisma sistemo forte subtenis junularan agadon, nealianciteco, frateco-unueco estis la idearo kiun oni obeis, sekvis, flegis. Bazo de la organizo estis larĝa, helpantoj kaj organizantoj venadis el najbaraj



respublikoj kaj alilande. Organiza komitato disponis pri oficejo, la asocio funkciis, kluboj aktivis en lernejoj, universitatoj, urboj.....centoj da junaj kaj ne tiom junaj homoj viglis ene kaj ĉirkaŭ la E-movado. Ĉu depost tiam pasis nur 33 jaroj? Ne longa periodo, eĉ en la vivo de unuopulo, sed...

Kontraŭesperanta genocido?

Komuna ŝtato ne plu ekzistas. Sarajevo fariĝis fama en internacia-tutmonda skalo pro terura milito kiu okazis. Bazo de la Esperanto-asocio ne plu estas 20 milionoj, sed unu kvinono, terminojn "nealianciteco", "frateco-unueco" junaj homoj eble eĉ ne konas kaj certe ne komprenas, ĉar la historio estas stranga scienco-ĝi perdas la fadenon. Ĉu ni povas paroli pri genocido en la kazo de la E-movado en Bosnio kaj

Hercegovino? Laŭ difino, genocido estas ago kontraŭ membroj de unu nacio, ĝia kultura, etna, genta, scienca... distingo (pli-malpli). Ĝi detruas koron kaj la plej valoran parton de ĉio kio karakterizas nacion: plej edukitaj kaj kapablaj homoj, plej konataj monumentoj, plej gravaj institucioj, kaj ke tio kio restu ne sufiĉu por restarigi normalan evoluon de la grupo.

Kaj kio okazis kun Esperanto en Bosnio? Mi atestas: ĝi ankaŭ estis viktimo de genocido! Ne ekzistis unue sufiĉe da "Esperantismo" ĉe multaj membroj kaj partoj de la E-organizo! Se male, hodiaŭ en LKK estus pli vigle, ĉar vigligus ĝin gejunuloj el Tuzla, Mostar, Zenica, Banja Luka, Doboj, Prijedor, Goraĵde, ĉiuj kune kun la sola ideo: restarigo kaj renaskigo de la E-movado.

La plej bonaj, la plej kleraj, la plej kapablaj membroj de la E-organizo en la naŭdekaj, do nur dekvin jarojn antaŭe, ne plu estas ĉi tie. Uzeir, Zijad, Suad...pereis, Mato, Miŝo, Straŝni - foriris, vivas alilande, laŭ la stranga kaj terura scenaro de ĉiu milito. Nada estas ie-tie. Multaj forlasis domojn kaj ekvivas aliloken, perdis ligon kun Esperanto, ĉar la vivo estas malfacila. Abrupte estis rompita kontinueco en evoluo kaj vivo de la E-movado en Bosnio kaj Hercegovino. Infanoj kiuj venis post la milito ne havis ŝancon lerni de tiu bonega generacio kiu malaperis dum la milito.

Feniksa generacio

Tial la ĉi-jara TEJO-kongreso en Sarajevo estas miraklo.

Grupo da gejunuloj kiujn tuj post la milito kaptis beleco de Esperanto kiel memkreska, ne kiel natura kontinuo, subite **gajnis** la IJK-on. Ne kiel postsekvon de disvolvo de la organizo kaj ĝiaj membroj, ne kiel rezulton de la organizaj, rimedaj, homaj agoj, celantaj "konkeri" aŭ "venki" la honoron organizi la TEJO kongreson.


Sed ankaŭ temas pri brilaj gejunuloj, kaj rezulton de ilia laboro kaj peno oni devas mezuri per specialaj mezuriloj, ĉar sen ejo, sen ilo, sen

monrimedoj ili tamen trovis la ĝustan kaj adekvatan temon pri kiu ili havas sperton kaj eĉ "ion pridiri".

Ĉar, ili vivas multkulturecon en la mondo kiu rapide tutmondiĝas. Ili spertis teruron de la Sarajeva sieĝo sub multkultura etoso.

Sed ili neniam antaŭe spertis teaman organizadon de iu internacia aŭ eĉ nacia kunveno. Ili ne havis eblecon lerni de antaŭuloj, vidi el la dua vico kio okazas, kaj kio bezonas. Ili tuj saltis al torento. Bravaj koroj!

Jen la TEJO kongreso en Sarajevo kiel miraklo de beleco de Esperanto-ideo, semita kaj memkreska post la terura milito.



Simbolo de la 62-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazanta en Sarajevo

Sarajevo akceptos partoprenantojn kaj gastojn tutkore, esperante ke la nobla etoso de tiu belega urbo ĉiam restos en memoroj de ĉiu vizitanto.

Maljunaj esperantistoj certe sentos devon starigi monumenton al tiuj kiuj malaperis dum la milito. Junuloj fariĝos plispertaj pri organizado lernante je la plej malfacila maniero-per sia propra haŭto. Kaj Sarajevo, spite al ĉio, post dekkvin jaroj denove estos loko de granda Esperanto-evento.

BONVENON!


BOSNIO

TITO KAJ BOSNIA MEMSTARIĜO

Multaj artikoloj kiuj lastatempe prilumas bosnian historion kutime traktas la periodojn de mezepoka reĝlando Bosnio (950-1463) la otomanan epokon (1463-1878), la aŭstro-hungaran (1878-1918), la jugoslavian - serban rojalisman (1918-1941), la kroatan faŝisman (1941-1945), la jugoslavian socialisman periodon (1945-1991), kaj la akton de sendependiĝo mem la 1 -an de marto 1992. En pluraj studoj ŝajne oni ne sufiĉe emfazas la rolon de Josip Broz Tito, kiel historia persono de tutmonda gravo, en la procezo de bosnia rememstariĝo.

Federacia skemo de Tito

Kiam Tito venis ĉefronte de Jugoslavia Komunista Partio en 1937 li strukturigis la partion kvazaŭ skizon de estonta nova Jugoslavio



Josip Broz Tito (1892 - 1980) famiĝis kiel organizanto de granda kontraŭfaŝisma rezisto (1941 - 1945), ŝtatestro de Jugoslavio kaj gvidanto de la movado de nealiancigitaj landoj

kiel federacia komunuaĵo de egalrajtaj nacioj, naciaj minoritataj kaj civitanoj. La partio estis organizita sur etna-nacia principo, kulturhistoriaj kaj geografiaj tutaĵoj. (Slovenio, Kroatio, Bosnio-Hercegovino, Serbio, Makedonio kaj Montenegro). En tia strukturo specialan lokon kaj traktadon ricevis provincoj Kosovo, Vojvodino kaj certatempe ankaŭ Sangako pro siaj specifajtoj.

Koncerne Bosnion jam en 1938 okazis la Unua regiona konferenco de JKP por Bosnio-Hercegovino. Tito tiel anticipis serbajn kaj kroatajn burĝajn partiojn kiuj en 1939 interkonsentis pri fakta divido de Bosnio-Hercegovino (la fama kontrakto Cvetković-Maček). Post disfalo kaj kapitulaco de la Reĝlando Jugoslavio en 1941 popol-liberigaj, kontraŭfaŝismaj militbataloj evoluos ĝuste laŭ la skemo de Tito. Temis pri unika kazo en Eŭropo ke popoloj de la disfalinta ŝtato-lando batalu per armita liberiga batalo, kiel la plej aŭtenta esprimado de la rajto je memdetermino, por kreiĝo de nova komuna ŝtato.

En la kvarjara batalo (1941-1945) Bosnio estis ĝia epicentro. Ĉiuj gravaj luktoj kaj ĉiuj gravaj decidoj kaj okazintaĵoj kiel rezulto de la batalo okazis sur la teritorio de Bosnio - Hercegovino. La unua Sesio de Kontraŭfaŝisma Konsilantaro de Jugoslavio (Milita Parlamento) okazis en Bihać (novembro 1942), la Unua Sesio de Kontraŭfaŝisma Konsilantaro de Bosnio - Hercegovino (ZAVNOBiH) en Mrkonjić Grad (25 novembro 1943), la Dua Sesio de Kontraŭfaŝisma Konsilantaro de Jugoslavio en Jajce (29-30 novembro 1943).

En la sesio en Mrkonjić Grad estas alprenita historia decido pri Bosnio - Hercegovino kiel egalrajta federacia

unuo kadre de nova Jugoslavio, fondota kelkajn tagojn poste en Jajce.

Restarigo de Bosnia ŝtateco

Konsiderante Bosnion-Hercegovinon plurilate plurisma lando en la Deklaracio de ZAVNOBiH estas emfazite ke Bosnio estas "**nek** serba, **nek** kroata, **nek** muzulmana (bosna)", sed "**kaj** serba, **kaj** kroata, **kaj** muzulmana (bosna)". Tial la 25-a de novembro estas la vera "Ŝtato-Tago" de Bosnio-Hercegovino. Estas emfzinde ke en la Dua sesio de ZAVNOBiH estas alprenita ankaŭ la Deklaracio pri rajtoj de civitanoj de Bosnio - Hercegovino (eĉ kvar jarojn antaŭ adopto de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj). Dum la epoko de Tito Bosnio-Hercegovino firmigis kaj grave antaŭenigis sian pozicion de egalrajta federacia unuo en socialisma Jugoslavio.

Sed post disfalo de la ŝtato en 1991 grandserbaj hegemoniuloj ĉefronte kun Slobodan Milošević kaj la kroataj hegemoniuloj ĉefronte kun Franjo Tuđman movis senkompromisan armitan agreson kontraŭ Bosnio pri kies teritorioj, kvankam malamikoj, ili bone interkompreniĝis. La fino de tiu plej turbulenta periodo en la bosnia historio estas signita en Dajtono kaj Parizo per subskribo de la packontrakto.

Okaze de la agreso kontraŭ Bosnio - Hercegovino la internacia komunumo kaj la Unuiĝintaj Nacioj malsukcesis en sia misio de pacgardantoj. La agreso finiĝis laŭ la principo "status quo", konfirmante rezultojn de la agreso. La tragedio de Srebrenica kaj rekorde longa sieĝo de Sarajevo estas paradigmoj de la suferado de Bosnio.

Mustafa Resulović

GENOCIDO

SREBRENICA - PARADIGMO DE LA KRIMO

Eĉ dek jarojn poste la genocido super bosnoj en Srebrenica daŭre okupas atenton de la enlanda kaj eksterlanda publiko kiel pro la nombro de viktimoj, samtiel pro formoj kaj metodoj de la krimoj kaj pro la amasa malobservado de homaj rajtoj.

Konsilio" (IPK) (marto 2002) kaj Raporto de la nederlanda Instituto pri milita dokumentado (10 aprilo 2002).

La vero konstatendas

Eĉ malgraŭ insistaj penoj por prilumi la genocidon super bosnoj en

Unuiĝintaj Nacioj, la tutan tempon ĝis okupacio de tiu regiono en julio 1995, kontraŭ tiea, plene izolita bosna loĝantaro, estis gvidataj specialaj militformoj kaj genocida detruado, kiel ekzemple: malhavigo de akvo, malhelpado kaj malpermesado de liverado de

*La 11-an de julio 2006 ĉe la Memor - centro POTOČARI estis entombigitaj novaj 505 identigitaj mortigitoj*

Por malkovri la "cerbojn", kaj tio signifas planintojn, instigintojn kaj ekzekutintojn de tiu ĉi la plej amasa eneŭropa krimo post la dua mondmilito, sekvis diversspecaj raportoj, parlamentaj enketoj, debatoj k.t.p. Ĥronologie observante apartajn ambiciojn tiuplane montris: "Raporto pri Srebrenica" de la Ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj (15 novembro 1999), Raporto de la Informa misio de la Franca parlamenteno formita je iniciato de la "Kuracistoj sen la limoj" (29 oktobro 2001), Raporto de la "Internacia Pac-

Srebrenica, la prezentitaj dokumentoj de diversa karaktero pro pluraj kialoj ne sukcesis ellabori veron pri tiu ĉi masakro.

Antaŭ ĉio oni ne deiras de tio ke nenie, kiel en Srebrenica, tiel klare esprimiĝas karaktero de la agreso kontraŭ Bosnio kaj Hercegovino, kaj ĝi estis perfidema, brutala kaj genocida. Nenie kiel en tiu regiono tiel publike, eĉ kun ĉeesto de soldatoj de Unuiĝintaj Nacioj (la nederlanda bataliono), oni faris genocidon super homoj. Eĉ malgraŭ tio ke Srebrenica estas proklamita "sekura zono" de

humanitara helpo, medikamentoj, energiaĵoj kaj de ĉio, en biologia-ekzistada senco nepre necesa por transvivado.

La masakro super bosnoj en Srebrenica estas tipa genocida akto plenumita laŭ establita matrico – la amasa krimego sekvas sukcesan militan operacon. La genocido kaj aliaj formoj de la krimo en Srebrenica estis zorge planitaj, tre bone organizitaj kaj sistemece plenumitaj. Pri tio atestas amplekso, uniformeco, rapideco kaj konsekvenco en plenumado de la krimo; interdepe-

deco de ĝia rezulto kaj de paralele gvidataj traktadoj sur diversaj niveloj de la internacia komunumo; dislokigo de ekzekutejoj kaj organizo de transportoj de viktimoj al ili; paŝoj pri maskado de preparlaboroj kaj forigado de spuroj de la krimoj; arsenalo de mistifikoj rilate al viktimoj, al propra kaj monda publiko, al envolvitaj anoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj ankaŭ de ĝiaj organoj. Por alvokado kapitulacii estis utiligitaj blankaj kirasveturiloj, uniformoj kaj kaskoj kun emblemoj de Unuiĝintaj Nacioj. Ĉio devis resti sen atestantoj; eĉ ankaŭ ŝoforoj de la kamionoj estis entiritaj en krimegon por ne rajti atesti.

Plurnivela respondeco

La plej grandan respondecon por la genocido super bosnoj en Srebrenica portas serbaj fortoj, respektive agresinto, ĉefronte kun Slobodan Milošević, kiu finis en Hago, kaj la serba politika kaj milita gvidantaro en Bosnio-Hercegovino. Ili organizis kaj aprobis tiun ĉi krimon. Ilian respondecon oni povas klare vidi, interalie, en atenta analizo de la krimo. Nome, sistema karaktero de la krimo, detala planado kaj maniero de la plenumado, indikas rektan respondecon kaj de la serba gvidantaro en Beogrado kaj de iliaj kunlaborantoj en Pale. * La mortigado estis lerte preparita kaj organizita. Tion tre efekte konfirmis juĝprocesoj en Hago kontraŭ komandantoj de la Drina-korpuso.

Por la genocido super bosnoj certamaniere respondecas ankaŭ altaj oficialuloj de Unuiĝintaj Nacioj, aparte altaj militaj komandantoj, sekve membroj-ŝtatoj de Unuiĝintaj Nacioj, registaroj de okcidentaj

momento de ĝia plenumado. Neniu en la mondo ion ajn entreprenis por savi milojn da homoj de certa morto.

La respondeco de eŭropa kaj internacia komunumo por neadvokata reago al la krimoj en Bosnio kaj precipe en Srebrenica estas evidenta. Eŭropo kaj la tuta mondo ŝajnis ke ili protektas homajn rajtojn. Pro Bosnio, kiel la 27-an de julio 1995 priskribis Mazovycki **"sur ĵetkubo estas stabileco mem de la internacia ordo kaj principoj de la civilizo"**.

Oni ne povas neglekti respondecon de la internacia komunumo ĉar ĝiaj reprezentantoj "sur alta nivelo" por partopreno en intertraktadoj kun farintoj de la krimo rekte kaŝadis masakron kiu paralele kun la intertraktadoj okazadis en Srebrenica kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

Akuza raporto de Mazovycki

Unuiĝintaj Nacioj, kvankam ili havis mandaton malinstigi atakojn al Srebrenica kaj la kvin aliaj "sekuraj zonoj" de Unuiĝintaj Nacioj en Bosnio – Hercegovino, "ili ne malhelpis serbajn atakojn al Srebrenica kaj teruregajn okazaĵojn kiuj sekvis". En aparato de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝenerale en la internacia komunumo, vere, **ne estis politika volo haltigi kaj malhelpi genocidon**. Tion pruvas pluraj faktoj, kaj precipe tiuj ligitaj al postuloj pri senpera elaera subteno dum atakado kaj okupado de Srebrenica kaj genocido super bosna loĝantaro.

Multaj sciis pri la genocido: viktimoj, farintoj, organoj de Unuiĝintaj Nacioj, pluraj inform-servoj, respensuloj en registaroj de multaj, precipe en Bosnio – Hercegovino engaĝitaj ŝtatoj.

Srebrenica. La nuna situacio postulas plurdirektan agadon de la internacia komunumo, registaraj kaj neregistaraj organizoj kaj de aŭtoritato en Bosnio-Hercegovino, sur ĉiuj niveloj. Honesta juĝproceso kontraŭ respondecaj politikaj kaj militaj oficialuloj, senkonsidere ilian pozicion, trudiĝas kiel imperativa bezono. Ŝlosila instrukcio en tiu konstelacio-Internacia Tribunalo por militaj krimoj en eksa Jugoslavio, levis ĝis nun plurajn akuzojn, kiuj interalie kulpigas la akuzitojn ankaŭ pri genocido, kiel la plej malfacila formo de krimo. Sed, respektante dimensiojn de la tragedio de Srebrenica, tio ne sufiĉas. Konsiderante portempan (ad-hock) karakteron de la Haga Tribunalo, estas aparte grave kapabligi kaj engaĝi enlandajn tribunalojn. Laŭ kelkaj pritaksoj eĉ ĉirkau 150 anoj de la Serba Soldataro bezonus esti procesiitaj pro krimegoj en Srebrenica. Oni ne povas permesi ke la personoj, kiuj faris krimojn, kaj kiujn la viktimoj konstante rekonas sur la stratoj, estas senĝene liberaj, kaj ne malofte ili plenumas publikajn funkciojn. Krom ĉio indikita, aparte oni devas akcenti ke grava nombro da akuzitoj, kaj inter ili la ĉefaj ordonintoj – Radovan Karadžić kaj Ratko Mladić, daŭre kaŝiĝas, spitante al viktimoj kaj al ĉiuj kiuj pro siaj funkcioj devus ilin aresti.

Trovi kaj identigi viktimojn

Malkovrado, elterigado kaj identigado de la mortigitoj en Srebrenica devus kontinue okazi kaj ankoraŭ pli intense, kion ne povas bari financaj rimedoj kaj aliaj antaŭkondiĉoj, gravaj por tiu delikata tasko. Familioj de mortigitoj meritas ke ĉiu viktimo estu trovota kaj digne enterigita, per kio oni evitas diversajn manipulaĵojn, precipe pri la nombro de mortigitoj dum la okazintaĵoj en Srebrenica en 1995. Ni estas atestantoj ke la serba flanko en Bosnio-Hercegovino, kiu estas la plej respondeca por krimoj, klopodas ĉiamaniere minimumigi kaj relativigi ilin, kaj per tio nebuligi efektivan respondecon.

Tiurilate okazis diversaj agmanieroj, kaj antaŭ ĉio dislokigado de mortigitoj al aliaj lokoj (t.n. sekundaraj tombejoj), kio estas evidenta ekzemplo pri kaŝado de la krimo. La pinto de tia praktiko estas la unua raporto de la registaro de la Respubliko Serba pri Srebrenica, en kiu menciigas cifero pri 1.800 mortigitoj, ĉefe batalantoj el tiu regiono.



La restaĵojn de la mortigitoj portas iliaj parencoj, najbaroj kaj kunloĝantoj, post la klinpreĝo, al iliaj eternaj ripozejoj

landoj, precipe la registaroj de Francio kaj Nederlando, sekve nederlandaj oficiroj, la t.n. Kontakto – grupo kaj aliaj. La grandpotencoj permesis plenumiĝon de la genocido super bosnoj kaj fermis okulojn en la

Juĝi la militkrimulojn

Srebrenica, kiel nesaniĝinta vundo, postulas konstantan postspuradon de la vero, ĉar tio estas minimumo kiun oni povas fari rilate al viktimoj de

Tiu ĉi raporto provokis ĝeneralan kondamnon de pluraj asocioj de ĉi Srebrenica, partioj, politikistoj kaj de la plej larĝa publiko en Bosnio-Hercegovino kaj ekster ĝi. Interalie la alta reprezentanto de internacia komunumo en Bosnio-Hercegovino karakterizis ĝin tendenca, ŝoka kaj provoka.

instruistojn de ilia etna aparteno, tion oni ne faras. Tia sinteno devigas gepatrojn reveni al Tuzla por ebligi edukadon de la infanoj. Multaj estas tend-kolonioj sur teritorio de Srebrenica kiuj atestas pri tragedio de homoj el tiu ĉi regiono, sed ankaŭ pri malzorgo de internacia komunumo kaj de aŭtoritatoj de Bosnio-

62-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

KONGRESA EKSKURSO

SREBRENICA



Familianoj de la viktimo



La viktimoj de Srebrenica konstante postulas dignan entombigon de iliaj plejaj karuloj, por ke ili kiel la tuta civilizita mondo povu viziti iliajn tombojn kaj honorigi ilin. Multe da tempo estis perdita por elekto de lokaĵo kaj por aliaj necesaj agoj pri konstruota Memor-centro en Potočari.

Malhelpoj al reveno de travivintoj

Lastatempe ĉiam pli aŭdiĝas neregistaraj organizadoj kaj juraj ekspertoj kiuj deziras formuli apartan akuzon por kompenso de damaĝo al transvivintaj loĝantoj de Srebrenica. Laŭ iuj informoj estas prilaboritaj ĉ. 6.000 aktoj de potencialaj akuzantoj, pri kio oni devas persisti, ĉar ĝi povus esti unu el kontentiĝoj por transvivintaj loĝantoj de Srebrenica. La reveno al Srebrenica okazas tre malrapide, kion grandparte respegulas obstrukcio, precipe de la aŭtoritato el serba respubliko, kiu klopodas ĉiamaniere tiun ĉi teritorion reteni "etne pura".

Tio manifestiĝas en pluraj kampoj antaŭ ĉio en foresto de helpo por renoviĝo de detruitaj objektoj, kaj donado de klerigaj kaj sanigaj servoj. Eĉ se ekzistas kondiĉoj certigi al infanoj de la revenintaj bosnoj

Hercegovino. Timo daŭre ĉeestas ĉe bosnaj revenintoj, kio precipe estas kondiĉite pro gvidaj funkcioj de unuopaj serbaj ekstremistoj en ĉiuj sferoj de socia vivo (precipe edukado).

La sola serbo kiu publike kondamnis genocidon en Srebrenica estas la eksurbestro de Srebrenica Desnica Radivojeviĉ, kiu emfazis ke "serboj devas akcepti tion okazintan kaj diri ĝustan veron, respektive pardonpeti por la genocido super bosnoj". Ĝis ne estu pli da tiaj ekzemploj, malfacile estas atendi repaciĝon, Srebrenica restas "bosnia varianta de rasapartiĝo" (Tereza Ŝole, brita volontulo en nederlanda organizo).

En Srebrenica oni batalas por demokrata kaj multetna Bosnio – Hercegovino, kia ĝia sola povas resti sur tiuj ĉi teritorioj.

d-ro Beĉir Macić

- * Vizito de la Memor-centro en Potočari.
- * Renkontiĝo kun la lokaj aŭtoritatoj kaj la "Patrinoj de Srebrenica".
- * Vizito al Tuzla

merkredon

la 9-an de aŭgusto 2006.

* Pale - bosnia urbeto sidejo de serba milita kaj politika gvidantaro dum la kontraŭbosnia milito

SARAJEVO

DUM LA SIEĜO - notoj el la vivo

Post bela ripozo dum la renkontiĝo MIRO kaj IJF mi revenis hejmen al Sarajevo. Mi aĉetis aŭtobusan bileton de Split ĝis Sarajevo. La aŭtobuso estis plena de rifuĝintoj kiuj revenis hejmen. Rigardinte detruitajn hejmojn, mi rememoris ĉiujn teruraĵojn de la ĵus finita milito. Finita! Povus esti, sed la infanoj ankoraŭ mortas pro kaŝitaj minkaptiloj, ni ankoraŭ ne havas sufiĉe da elektroenergio, akvo aŭ gaso, kaj la salajroj estas mizeregaj. Plejmulto da homoj opinias ke la Dejtona packontrakto solvis nenion, sed ĝi almenaŭ haltigis la batalojn. Ne estas facile diri ĉu la milito reokazos, tio dependas de lokaj kaj mondaj politikistoj, sed ekzistas la timo pri reveno de teruraj kvar jaroj. Kvar jaroj! Teruraj kvar jaroj de la sieĝo! Kio okazis! Kiel mi travivis!

Sen nutraĵo

Komence de la milito, en aprilo 1992, la krimuloj ŝtelis ĉion kio ekzistis en la vendejoj krom libroj. Tiam la milito ne estis tre klara. Nek ekzistis formita Bosnia armeo, nek estis konate kies soldatoj estis en kiu parto de la urbo. La artilerio ne estis tre ofte uzata, kaj ĝis la fino de aprilo ankoraŭ funkciis fervoja, aŭtobusa kaj aviadila stacidomoj. Mi restis en mia hejmo atendinte sekvajn okazojn. Mi esperis ke la situacio baldaŭ pliboniĝos. Kia eraro!

Kiam la serba estraro vidis ke ili ne sukcesos rapide subigi Sarajevo, ekde la 2-a de majo 1992 ili enkondukis eksjugoslavian armeon en la militon.

La eksjugoslavia armeo okupis urban aerhavenon, malliberigis ŝtatan prezidanton kaj grenadumis la urbon de mateno ĝis nokto. Tiam komenciĝis la vera terura milito. Post la unua ĉesigo de elektroenergio, ĉiuj nutraĵoj en frostujo komencis putri. Mia familio (gepatroj, fratino kaj mi), restis sen nutraĵoj en la hejmo, kaj ne estis eble aĉeti ion. Ni havis nek fornon nek lignaĵon, ĉar antaŭ la milito ni uzis centran varmigilon kaj elektrokuirilon. En kelkaj periodoj la sola nutraĵo estis rebakita pano aŭ makaronioj. Mi perdis dudek

kilogramojn, preskaŭ kvaronon de mia pezo. Post kelkaj monatoj ni aĉetis fornon faritan de rubaĵujo kiu kostis eĉ 25 eŭrojn.

Ekde fino de julio en Sarajevo ekalvenis la helpo en nutraĵoj. Ili ne sufiĉis, kaj ne estis bonkvalitaj, eĉ ofte sufiĉe malnovaj, sed Sarajevanoj sukcesis fari miraklojn. La homoj tre rapide elpensis kiel multigi la ricevaĵojn. Ekzemple, neniu manĝis solan pasteĉon sed miksis ĝin kun faruno kaj akvo kaj tiel trioblis ĝin. La gastdonacoj ne estis kiel antaŭe, floroj, ĉokoladoj, fruktoj, sed ekzemple unu terpomo aŭ cepo! La homoj kiuj povis helpi unu al aliaj, helpis. La solidareco ne konis naciecojn, kaj tial Karadžić ne sukcesis venki kontraŭ la spirito de Sarajevo.

Kun mortoj

La milito daŭris. En la cirklo de tridek metroj ĉirkaŭ mia hejmo estis almenaŭ dudek murditoj. Mia hejmo estis je malpli ol kvincent metrojn de frontlinio, kaj optopafistoj povis vidi ĝin. Tial ni ne uzis ĉefan enirejon de la domo, sed la helpan, ĉar ĝi ne estis videbla. Tamen, ne estis bona ideo stari ĉe la helpa enirejo ĉar ĝi estis ofte atakita per grenadoj. Tiel pereis multaj miaj najbaroj. Unu mia najbarino perdis du filojn kaj edzon. Nur hazardo (aŭ la Dio se ĝi ekzistas) savis mian familion. Pro grenadoj mia domo restis sen fenestroj. Anstataŭ ili ni ricevis plastikfoliojn kiel donacon de UN. Alvenis la vintro. Ni havis nek lignaĵon nek karbon, nur kelkajn kajerojn apenaŭ sufiĉajn por prepari makaroniojn. En la hejmo estis tre froste. La temperaturo en mia dormoĉambro nokte estis sub nulo!

Sen akvo

Iam Sarajevo estis fama pro sia akvo. Ni havas popolan kanton: Kiu trinkus Baŝĉarŝian akvon iam, Forlasi Sarajevo, li povus neniam! Serba armeo multfoje fermis la urbajn akvofontojn, kaj ni devis atendi en longaj vicoj por kelkaj litroj da trinkebla akvo. Kelkfoje mi devis

pediri kilometrojn kaj kilometrojn por trovi pumpilon.

La pumpiloj estis ofta celo por serba artilerio, kaj kolektado de akvo estis tre danĝera. Sonas nekredeble, sed ni kolektis malpuran brunan akvon el marĉo por necesejo kaj ŝparis ĝin kiel valoraĵon.

Sen mono

Mi jam diris ke ĉiuj vendejoj estis dezertigitaj. Funkciis nur kelkaj vendoplacoj kie homoj vendis nutraĵojn (ŝtelitajn, kontraŭbanditajn aŭ sian propran) kaj alian varon. Jen kelkaj prezoj fine de decembro 1992:

Kafo (1 kg)	65 €
Sukero (1 kg)	25 €
Ovo (1)	3,5 €
Cigaretoj (1 skatolo)	3,5 €
Benzino (1 l)	20 €
Biciklo	75 €
Automobilo	500 €

Salajro! Tiam mi kiel soldato ricevis proksimume 2-3 eŭrojn monate. Tamen, fine de 1992 kelkaj plej kuraĝaj homoj kurinte trans aviadila flugejo trovis eliron el la urbo. Sur alia flanko de la aerhaveno ekzistis vojo trans la montaro Igman, la sola montaro ĉirkaŭ la urbo kiun serba armeo ne okupis. Tie la prezoj estis preskaŭ "normalaj" kiel en Eŭropo kaj por multaj tio estis bona (sed danĝera) ŝanco por riĉiĝo.

De teruro al terurego

Post malsukceso de packunveno en Genevo, komence de 1993, komenciĝis la plej terura periodo de la milito, meze de 1993.

Tiam estis la milito inter Bosnia armeo kaj Kroata soldataro en Hercegovino kaj meza Bosnio. Eĉ tiuj maloftaj komercaj kaj humanhelpaj nutraĵoj ĉesis veni. Serba armeo okupis grandan teritorion sude de Sarajevo kaj grandan parton de la montaro Igman. Komenciĝis granda serba atako al la urbo. Mi jam timis ke tio povus esti la lastaj tagoj de mia lando kaj de mia vivo

Tiam pereis mia bona amiko, ankaŭ la plej bona landa esperantisto Uzeir radio komenciĝis programo en Esperanto.



La detruita konstruaĵo de ĉefpoŝtejo

Jusupoviĉ. Mi konis lin dek jarojn, ni estis membroj de la sama E-klubo, ni studis la saman fakultaton, kaj ni estis en la sama armea brigado. Lia morto estis terura, ĉar grenado disigis lian korpon en nekoneblajn erojn. Sed sarajevanoj ree faris la miraklon. Helpe de brigadoj el aliaj urboj oni sukcesis haltigi la ofensivon kaj organizi fortajn defendoliniojn. Tiam oni elfosis tunelon sub la aerhaveno. La tunelo estis malalta, mallarĝa apenaŭ sufiĉa por trapasado de unu homo kaj estis tre lacige pasi ĝin. Post la tunelo oni devis nokte vojaĝi piede aŭ automobile sen la lumo laŭ mallarĝa makadama vojo trans montaro Igman.

Kun studlibroj

Tamen mi ne deziris ke la milito haltigu mian studadon. Ekde aŭgusto 1992 la profesoroj organizis ekzamenojn kaj de septembro 1993 ankaŭ prelegojn. Multaj profesoroj eliris el la urbo, sed la restintaj akceptis iliajn studobjektojn.

Dum la deĵorado en kazerno, nezorginte pri grenadoj, mi lernis kaj preparis la ekzamenojn, kaj kiam ajn mi havis liberan tempon, mi vizitadis la prelegojn. Mi ankaŭ deziris fari bonan komputilan programon kun unu mia amiko, kiam ajn mi havis iom da elektroenergio.

La jaro 1994 estis pli bona. Tiam ni enkondukis gason kaj la vintro ne plu estis terura.

La elektroenergio ankoraŭ ne estis tre ofta (ekzemple ĉiun duan nokton dum du tri horoj). Post serba atako al ĉefa vendoplaco kaj minaco de NATO-alianco la stato en la urbo estis pli trankvila, malfermiĝis "blua vojo" ĉirkaŭ aerhaveno. La milito inter bosnianoj kaj kroatoj ĉesis kaj la vendejoj pleniĝis. La prezoj estis normalaj, kaj ekfunkciis la tramo. En

Ekbriloj de la fino

Sed tio ne estis fino de la sieĝo. En aŭtuno serboj fermis la bluan vojaron, kaj la tunelo ree estis la sola eliro. Sed nun, la Armeo de Bosnio kaj Hercegovino estis sufiĉe forta kaj preta por venkoj.

La soldatoj el Sarajevo (mi ankaŭ) nun iris helpi al aliaj urboj. Tiu trompema paco daŭris ĝis la mezo de 1995. Tiam la

bosnia armeo provis liberigi la urbon, kaj serboj venĝe ekuzis novan armilon, modifitajn aviadilajn bombojn. Unu tia bombego povis tute detruki kvaretaĝan konstruaĵon.

La ofensivo de bosnia armeo ne sukcesis liberigi Sarajevojn, sed tamen malfortigis serban armeon. En la sama periodo NATO finfine helpis per siaj aviadiloj, kaj komenciĝis granda malvenko de serba armeo.

La packontrakto en Dejtono finigis la militon. Mi malsoldatiĝis kaj finis la fakultaton. Nun mi povis feliĉe spiri, ĉar mia familio restis viva.

Serbaj soldatoj forlasis la urbon komence de marto 1996. Finfine ni povas facile vojaĝi, per normala aŭtobuso de stacidomo eĉ eksterlanden.

La sieĝo estas finita. Ĝi daŭris pli longe ol la sieĝo de Leningrado aŭ Okcidenta Berlino.

La unuan fojon mi vojaĝis (krom armeaj agadoj) ekster la urbo kaj la lando. Tio estis renkontiĝoj MIRO kaj IJF, komence de aprilo 1996.

Mi dankas al kroataj kaj italaj esperantistoj por iliaj invitoj kaj senpaga partopreno.

La ĉeftemo de MIRO estis fabeloj, sed mi pensas ke tiu mia vivfabelo estas ankaŭ mirakla, sed tamen vera.

Nun, mi revenas hejmen post neforgesebla partoprenado en MIRO kaj IJF. Mi puŝas la sonorilon, kaj la panjo malfermas la pordon kisanter min.

Ne gravas kio okazis, mi ankoraŭ amas mian hejmon, la urbon kaj la landon!

Samir Ribić

verkita en aŭtuno 1996

62-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

DUONTAGA EKSKURSO

MILITA TUNELO



- La tunelon (1,0 m' larĝan kaj 1,5-2,0 m' altan) sub la flughaveno de Sarajevo de kvartalo Dobrinja ĝis kolonio Butmir longan 760 m' fosis bosnia armeo en 1993 por faciligi sekuran eliron el la urbo kaj venki ĝian kompletan militan blokiĝon.
- La elirejo/enirejo en Butmir estas konservita kiel privata muzeo pri la fama tunelo.

ekkonu kaj spertu la vivon dum la sieĝo de Sarajevo

ĵaŭdon

la 10-an de aŭgusto 2006.

BOSNIANINO EN LA KORO



Françoise Noireau

Noto pri la aŭtorino

Kvardekdu jara, tri adoleskaj gefiloj, laboras de dudekdu jaroj kiel instruistino kaj nun specialiĝis en psikoterapeŭta helpo al infanoj blokita en la lernado kaj memfido. Logis dudekdu jarojn en Briançon, urbeto en la francaj Alpoj, ok km de Italio, cent ok km de Torino, la plej alta urbeto en Eŭropo. Post disiĝo ŝi translokiĝis al la lazura marbordo okcidente de Saint Tropez. Lernas aŭtodidakte la bosnan de preskaŭ kvar jaroj per libroj kaj serĉas okazajn paroli. Ŝi volontulas de septembro 2005 kiel interpretisto en asocio de helpo al azilpetantoj en tiu regiono. Tradukas por ciganoj persekutataj de serboj en serba respubliko de Bosnio aŭ de milita polico en Serbio. Temas pri juraj kaj kuracistaj konversacioj.

Kiam mi la unuan fojon vojaĝis al Bosnio estis aŭgusto de 2002, dek jarojn post komenco de la sieĝo de Sarajevo. Mi gardas en la memoro kvazaŭ kulposenton pro tio ke mi naskis mian trian infanon la 2-an de aprilo 1992, kaj ne havis intereson nek tempon por agi aŭ minimume partopreni en asocioj kiuj defendis la homajn rajtojn en Bosnio.

Mi kelkfoje sendis leterojn kaj poŝtkartojn en Esperanto por kuraĝigi homojn tie (nekonatulojn, esperantistojn), sed ili revenis al mi kun poŝta stampo "resendita pro la milita stato". Kun geamikoj ni parolis pri tio ke bosnianoj devus havi rajton sin defendi, ke la eŭropaj landoj devus interveni, sed mi ne aktive engaĝiĝis en tiu kampo. Mi mamnutris mian bebon tri jarojn, parolis Esperanton hejme kun miaj tri junaj gefiloj, mia modesta maniero agi por la paco. Eble mi skribis al François Mitterrand, povas esti, mi ne plu certas pri tio... Sed somere 2004 mi revenis al Bosnio kun tiu "bebo", Letisja BERT, ŝi tiam estis 12 jaraĝa knabino, parolas Esperanton denaske kaj estas vera esperantistino.

Kiujn mi renkontis en Bosnio?

En la urbo la homoj estas okupitaj kaj ne tre malfermaj, ne multe demandantaj, scivolemaj. En la kamparo ili estas pli profundemaj, montras pli pri si mem kaj rekte demandas pri mi. Ilia koro estas foje pli naŭva, pli varma. Mi renkontis pasportservanojn, esperantistojn, membrojn de Servas-organizo, gepatrojn de rifuĝintinoj al mia urbeto, petveturantojn (multajn) kiuj estas pli diversa reprezento de la popolo ol esperantistoj. Kelkaj homoj tute malferme alparolas min, ekz. en tramo, rimarkinte ke



novkonstruita

**MALNOVA
PONTO**

en Mostar

mi estas eksterlanda. Kaj tio plaĉas al mi, mi ŝategas renkonti novajn homojn, ĉiu havas sian personecon, sian mesaĝon, ĉiu instruas min. Mi ekskursis al Bjelaŝnica kun mia amiko Amir, ni ambaŭ ŝategas montaron. La naturo similas kiel en mia regiono. Strangas nur la klimato, ĉar apud Sarajevo povas subite ekpluvi kaj eĉ hajli, senaverte.

Kie mi estis en Bosnio kaj Hercegovino?

Mi tranoktis en Sarajevo kaj Mostar. Fakte nun mi ankoraŭ pli ŝatas Mostar, pro la klimato kaj la urbo-centro. Kiom bone estas promeni tie, sidi ĉe kafejo, paŝi kaj repaŝi la ponton "Stari Most" kiel tipa turistino! Mi memoras (iomete) kion mi legis pri la pasinteco de la urbo, la tragikaj okazintaĵoj, mi memoras pri miaj geamikoj en Mostar, simplaj homoj, loĝantaj en la plej supra etaĝo de alta sociala loĝejo kun trukriplita fasado... kvankam la avo havas nur unu kruron... la granda foto de la filo ĉe la muro... la varmeco en ilia loĝejo, la parencoj, la avinoj en la vilaĝeto tre for, la bonegaj banadoj en la rivero Neretva...

Pasintjare mi planis vojaĝi longe. Mia sola fiksa dato estis: ke mi estu la 23-an de julio en Mostar, por inaŭgura ceremonio de rekonstruita ponto. Sed ĝuste miaj konatuloj tie tre timis atencojn kaj intencis resti enfermitaj en siaj apartamentoj en tiu tago, spekti ĝin en la televidilo... kiom da energio por teni mian decidon ke mia filino kaj mi absolute deziras partopreni, kiel atestantoj, por simbole esprimi: jen ni, homoj de najbara lando, kulpa lando pro nehelo en la ĝusta momento, ni agnoskas, ni pardonpetas, ni ĝojas kun vi la gravecon de la rekonstruo, ni estas ĉi tie en tiu tago por diri: estu ponto inter la popoloj, estu la ŝtato Bosnio kaj Hercegovino, eĉ se ne perfekta tamen verŝajne la malplej malbona solvo por kunvivado en demokratio... Kaj ni rezervis tablon en la restoracio "Bella Vista" kie laboras nia gastigantino kaj ni estis ege bele situataj por spekti la emocivekan ceremonion... ankaŭ mi ellasis larmojn pro la muziko, la kantoj, la dancoj... Samtempe estis televidilo ene de la restoracio kaj ni povis vidi la vizaĝojn de la politikistoj... Mi ne lertas en politiko, ne interesiĝas, mi estas pacifistino.

Kaj mi estas konvinkita kiel mia amiko Amir ke naciismo estas la infanaĝa malsano de la homaro (tiun ideon li pruntis de Einstein). Ankaŭ li venis de Danio kaj ĉeestis la ceremonion, sed mi ne renkontis lin tiam.

Mia unua vojaĝo, kiujn impresojn mi memoras pri ĝi?

La ŝoko estis la detruitaj domoj surrante, alvenante tra Slavonski Brod. Kvankam mi teorie multe preparis tiun unuan vojaĝon legante ĉion kion mi trovis pri eksa Jugoslavio en la urba biblioteko, mi frapiĝis vidinte la kaosan vidaĵon: domoj sen fenestroj, sen tegmentoj, bruligitaj, nigritaj, handicapita maljunulino portita sur unurada ĉareto, muzulmanaj modestaj blankaj tomboj plantitaj ĉie, ĝis la rando de la asfalto laŭlonge de tiu internacia vojo... Mi memoras ke mi bezonis skatolon de paperaj naztukoj sur la apuda seĝo de mia minibuso, mi larmis enveturante Bosnion...



Kun bosnianoj dum promenado sur stratoj de Baŝĉarŝija

Feliĉe Senad kaj Azra improvize akceptis min, kvankam ili ne estas en la Pasporta Servo, kaj mi ne antaŭsciis la malfacilaĵojn pri gastigado en Bosnio. Mi memoras la surprizan unuan vesperon: ili atendis gaston por komune rigardi televidan elsendon pri literaturo: Kemal. Surprizo estis por mi ekvidi sur la ekrano de la televidilo ĝuste mian gastiganton, Senad! Kelkajn tagojn poste, promenante kun Anida en librovendejoj mi hazarde trovis vortaron bosna-Esperanto, 4.000 vortoj, taŭga malgranda vortaro por komenci lerni la lingvon...

Vespere mi fiere montris ĝin al Senad... Vi, bosnia leganto, certe divenas kio okazis: li ridis kaj diris ke li kunaŭtoris ĝin kaj ke li povas donaci al mi unu ekzempleron se mi deziras.

Kiel mi vojaĝas tien kaj tie, kiamaniere mi turismas/anedkoto?

Komence mi agis iom senpripense, ĉar mi ne sciis kiom malfacile estas loĝi en Sarajevo. Nun mi frue organizas mian restadon, petante gastigon de geamikoj, konatuloj, gastigantoj el la adresaroj Pasporta Servo, Amikeca Reto, el la listo Servas aŭ Couchsurfing... Mi vojaĝis sola kaj duope kun mia plej juna filino, denaska esperantistino, kiam okazis la REF (Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj) organizita de Csilla en Vojvodino.

Esperantistoj de Svisio, hungaroj de Vojvodino invitis min al la insulo Ada Bojana, survoje mi estis haltita de policistoj, apenaŭ mi eniris en Montenegron, en la Serba ŝtato. Ili postulis monon pro manko de la laŭlega sekurvalizo ("hitna pomoć") kvankam mia ruĝkruca valizo estas plena de konsilataj aĵoj, sed ne laŭ la oficiala listo de Montenegro... post longa diskuto "ĉiamaniere vi ne blinkis kiam mi haltigis vin ... "jes mi blinkis!" mi pagis kion ili volis (fakte la sumo malsupreniris de 20 eŭroj ĝis 10, 9 kaj fine 5 eŭroj, kun premio: mi ricevis grandan bongustan glaciaĵon, same por mia filino... Sci ke tio okazis sur dezerta vojo, en plena suno, verŝajne de pli ol 40 gradoj celsiusaj. Lekante mian "sladoled" mi ekpensis: "Nun mi komprenas kial la filmoj de Emir Kusturica estas tiom fantaziaj! En tiu lando la realeco superas la imagojn!"

Kiel esti feliĉa kiam oni restas hejme

Oni ne ĉiam havas monon kaj tempon por vojaĝi al Bosnio, sed tamen eblas esti feliĉa! En mia eta apartamento mi ofertas al miaj gastoj bosnian kafon (malmodeste tiel nomitan), klopodas akiri "rahat lokum" por plenigi la belegan skatoleton donacitan de Vasvija, manĝas frititajn paprikojn kaj melongenojn laŭ la recepto de Amir, kaj esceptokaze baklavojn, kiam mi veturas al Grenoble por aĉeti ilin... La "bamijo" pendas ĉe la pordeto... mi gardas ĝin kiel raran legomon kaj iom polvan memoraĵon pri vizito kun Anida al ŝia avino en hospitalo. Mi bedaŭras ne havi bakforon por baki kukon de papavetosemoj (kolaĉ s' makom). La nomo mem ravigas min... kiom ekzotika! Kaj nun mi eĉ scias baki "hurmaŝice" ĉe miaj amikinoj, lernis tion de deĵoranta soldato sur la montopinto Bjelaŝnica, en la meteologia stacio, kiam mi pasigis tie

supre kvin tagojn kun Munir, kaj lernis rapidege dikti numerojn en la bosna por lia raporto... Tie supre mi sentis min kiel en mara lumturo! Ekstaze estas trinki bosnan kafon por tiu fajna pulvoro kiun Kemal reportis de Kosovo kiel donaco al mi... kun muzika fono de "Sevdalinke aŭ Ilahije" kiujn mi akiris en Mostar... En tiu epoko, por daŭre teni la lingvon, ĉar mi preferas lingvon ol la nutraĵojn, mi malrapide legis ĉu en la kroata, ĉu en la bosna, ĉu en la serba, gustumante miajn librojn (fakte la tri dialektojn mi tiel nomas, ne precize sciante ĉu mi diru ekavski, jekavski kaj ijekavski.). Tiam mi finlegis du librojn, unu dikan pri memevoluo en la kroata, skribita de psikoterapeŭto kiun mi vizitis en Zagrebo kun mia esperanta amikino Ankica: "Hvala Ti ljubavi!" Alia estis amuza en ekava dialekto, sed aĉetita en Split, traduko de franca bildstrio "Kad vam Gaŝ'a zaprži čorbu", dimanĉe vespere mi foje vizitis bosnian-bosnan amikilon el Mostar, kiu loĝis en mia urbeto, por ke ŝi helpu min kompreni la parolan foje slangon lingvon, interŝanĝe mi helpis ŝian filon lerni la francan ortografion. Trie mi aŭskultadis kantojn kiujn mi prilaboris por traduki la tekstojn: Bijelo Dugme, Crvena Jabuka, Riblja Čorba, Azra.. kiujn mia slovena amikino Simona kopiis por mi, kaj precipe la lastan de Dino Merlin "Burek" kiun Anida donacis al mi en Sarajevo... Mi ŝatus ekkoni engaĝitajn aŭ melankoliajn kantistojn kun belaj tekstoj, ne rokajn.



Kun la filinoj Letisja kaj Marjolen

Miaj gustoj kiuj aspektas strangaj en Francio estas "normalaj" ĉe kelkaj bosnianoj ĉe kiuj mi vivis. Eble tiuj homoj estas esceptoj? Mi ne scias. Sed ekzemple: mi ŝatas aldoni malvarman akvon en mian teon kiam ĝi tro malvarmas, mi ne ŝatas kafon krom la irlandan kaj la bosnian, mi ŝatas manĝi rapide ĉiujn pladojn sinsekve kaj babili poste kun la kafo. En Francio tagmanĝo daŭras horojn, ju pli longe la dommastrino atendigas siajn gastojn inter ĉiu plado, des pli alte ŝi respektas kaj montras tion al ili...

Mi ŝatas vestiĝi en ginza ensemblo (jako+pantalono) kun granda fulardo (koltuko), kaj tio ĝuste estas laŭmoda en Sarajevo kaj eĉ tuta eksa Jugoslavio.

Mi amas la lingvon, ĉu vi scias ke via lingvo estas la sola tonala lingvo en Eŭropo?



Amir, Françoise kaj Vildana

Ĝi apartenas al la kategorio de tonaj lingvoj pro ĝiaj longaj kaj mallongaj supren kaj malsupren-irantaj akcentoj. La prononco estas tre malfacila por artikulacii, minimume dum la unua jaro de lernado. Poste ĝenas la nekomprenejo de la finaĵoj pro la multaj deklinacioj, kvankam mi longe studis la latinan kaj la grekan, kaj flue parolas germane. Nesolveblaj estas tiuj duoblaj verboj "trajan-netrajan glagol"! Vere via lingvo estas malfacila por ni francoj, kaj ne vane vi havas la esprimon "praviti se Francuz"!

"Kial tiu amo por nia lingvo", demandas ofte homoj en eksa Jugoslavio. Kial vi, vojaĝema, esperantistino, scivolema, denove planas vojaĝi al Bosnio, anstataŭ malkovri alian landon? "Pro la bongustaj tomatoj!" mi respondis, vere, ĉar tie ĉe vi la manĝaĵoj ne gustas industrie kiel ĉe ni... Amikinoj ofte min demandis: "Vi kiu estas scivolema, interesiĝas pri ĉio, ĉu vi ne scivolas malkovri alian novan landon, kiaj plian fojon Jugoslavion?" Mi senpripense rebatis: "Pro la bongustaj tomatoj!" Jes vere, la manĝaĵoj en orienteŭropaj landoj estas pli bongustaj, pli naturaj, pli variaj, diversecaj, pli tradiciaj, pli longe preparataj ol en Francio ĝenerale. Ĉe ni, krom ĉe kelkaj ekologiemoj en la kamparo aŭ en la montaro, regas la nutro-industrio, ĉio estas enpakita en plaston kaj estas sengusta! Ĉio samas ĉie.

Sincere dirite, mi preferas enprofundiĝi en unu landon kun la tuta koro ol supraĵe trakuri la mondon kvazaŭ kolektante landojn.

Nur sciu ke post nur ok tagoj en Sarajevo, dum pluraj tagoj post mia reveno en la montaro mankis al mi la "kanto", la voĉo de muezino surstrate kaj en la ĉambroj. Kvazaŭ en antaŭa vivo mi konis tion kaj tiuj kelkaj tagoj en Sarajevo vekis subkonscian memoron...ke mia koro ŝvelas aŭdante tiun lingvon, ke miaj pulmoj pleniĝas de aero ekrevante pri reveturo al Bosnio.

Amo/Gusto/Rememoro

Projekcio de rememoroj, emo al esperatoj pleniĝas miajn mankojn. Enamiĝo al tio kio reprezentas idealon kiu kontaktigas min kun la vere grava fundamento kaj senco de la vivo, emo al enprofundiĝo, al evoluo al saĝeco. Mi duonvidas eblan enirpordon al la kompreno de la senco de la vivo kontaktante homojn de Bosnio, verŝajne ĉar ili travivis tragedion kaj tio tuŝis kaj puŝis ilin. Se mi havus monon kaj kuraĝon kaj emon vojaĝi aliloken eble mi povus trovi tiun flameton de aŭtenteco en la homa animo. Eble ĉe tre malriĉaj homoj aŭ la homoj kiuj travivis malfeliĉon.

Kial mi planas reveturi al Bosnio?

Aktuale mi pensas ke mi ŝatas kion mi faras kaj mi faras kion mi ŝatas, mi ne havas akran nostalgion, ne bremsan melankolon, ne altan celon. Mi estas tre okupita ĉar mi havas tro da intereso en mia vivo, aktuale violonon kaj apenaŭ mandolinon, kaj mi tro ŝatas ordon kaj purigadon...

Lasta aldonindaĵo estas ke mi revenis al Bosnio kun mia filino, la plej aĝa, Marjolen. Ni vojaĝas, vizitadas kaj ŝi partoprenas al la IJK en Sarajevo!

JUNULARO

TAMEN moviĝas

En Banja Vručica, tre agrabla Eripozejo, distancita je kvar kilometroj de urbeto Teslić, en oktobro 2004 okazis seminario TAMEN.

Tamen estas akronimo por "Teslića alvoko moviĝi al eŭropa nacieco", kaj celo de seminario estis vekigi pensojn kaj strebojn de ĉiuj partoprenantoj al nia kumuna celo: Eŭropa Unio.

Programo de la seminario enhavis kvin prelegojn kun temoj rilataj al la ĉefa.

Laborgrupoj kiujn gvidis la sola partoprenantino de seminario kiu estas loĝanto de EU, slovenino Manca, estis la plej amuza afero de oficiala parto de la seminario. Tio estis la plej aktiva kaj plej bona maniero por pli bone ekkoni EU kaj profunde pripensi pri niaj esperoj de la eniro en EU.

Unu el plej gravaj aferoj rilataj al la seminario TAMEN estas la fakto ke ĉiuj partoprenantoj venis el eks-jugoslaviaj landoj, kaj tial, ĉiuj temoj pri kiuj oni diskutis estis gravaj kaj interesaj por ĉiuj. Ĉiu partoprenanto povis doni siajn

komentarojn, spertojn kaj proponi solvojn de problemoj kaj ĉiuj povis kunlabori.

La seminario estis ege serioza kaj ni ĉiuj devis komplete partopreni kaj aktive labori. Sed tio ne signifas ke amuzo mankis. Ni povis uzi bazenon kaj aliajn amuzejojn en la hotelo, kaj dum la nokto ni ĉiuj amuziĝis en la hotela restoracio kun aliaj gastoj de hotelo.

La seminario bedaŭrinde ne solvis problemojn kiujn ni ĉiuj havas en nia vojo al Eŭropa Unio, sed ĉiu partoprenanto komencis pensi kaj paroli pri ĉio kion ni mem povas fari por rapidigi la paŝadon al EU. Unu el la konkludoj de la seminario estis ke



Partoprenantoj de la seminario

ni ĉiuj kiel individuoj devas helpi promocion de kunvivado kaj edukado. Ĝis efektiva eniro en EU-n ni povas nur esperi pri pliaj similaj seminarioj en nia lando kaj labori por la komuna celo.

Vildana Delalić

EKONOMIO

PICEJO ★ ESPERO ★ EN SARAJEVO

Elstara membro de la Esperanto Societo Sarajevo s-ro Ismet Duro malfermis restoracion-picejon sub nomo "Espero" en najbara urbeto Ilidža, en kvartalo Otes. Per telefona mendo (tel. 629 355) vi povas ricevi multnombrajn picojn al via hejmo, oficejo ks. S-ro Ismet Duro estas

Esperanto societo Sarajevo. La kurson gvidis prof. Bojo Popović. Duro partoprenis en pluraj internaciaj kaj jugoslaviaj E-aranĝoj, ĉefe fervojistaj (kongresoj kaj renkontiĝoj), JEL-kongresoj, Unuamajaj renkontiĝoj. Kune kun prof. Nenad Radoš li organizis E-kursojn kaj

Unuamajan renkontiĝon en Višegrad. De post 1980 Duro vivas kaj laboras en Sarajevo, kaj partoprenas en aktivecoj de la Esperanto societo Sarajevo kaj de la Esperanto Ligo de BkH.

Kiel ĉe aliaj picejoj la multspecajn picojn la aĉetantoj ĉe la picejo



emerita fervojisto, lokomotivestro. Ismet naskiĝis en bosna urbo Višegrad 1940. Li lernis Esperanton kiel mezlernejo en 1957 ĉe

fondis Esperanto-klubon en Višegrad en 1977, kaj en 1978 organizis

ESPERO ricevas en papera skatolo kun granda nomo "ESPERO" (senpaga hejma livero).

PIZZERIA		ESPERO	
ul. Barska 36. Ilidža			
KUCNA DOSTAVA Tel. 629-355			
PIZZE:		MALA	VELIKA
01. MONTE CARLO	(paradajz sos, junetina, priŝuta, glijve, paradajz, krastavac, fataroni)	5 KM	6 KM
02. CAPRICCOZA	(paradajz sos, sir, junetina, priŝuta, glijve)	4 KM	5 KM
03. CALZZONA	(paradajz sos, sir, meso, glijve, tatar sos)	5 KM	5 KM
04. ESPERO	(paradajz sos, junetina, priŝuta, glijve, jaje, povriće, fataroni)	6 KM	7 KM
05. QUATRO STAGIONE	(paradajz sos, junetina, priŝuta, glijve, krastavac, fataroni)	4 KM	5 KM
06. VEGETARIANA	(paradajz sos, sir, svježe povriće)	4 KM	5 KM
07. MARGARITA	(paradajz sos, sir)	3 KM	4 KM
08. TONO	(paradajz sos, sir, tunjevinna)	4 KM	5 KM
09. HAWAII	(paradajz sos, sir, ananas, junetina)	5 KM	6 KM
10. FUNGI	(paradajz sos, sir, glijve)	4 KM	5 KM
11. TONO E CIPOLA	(paradajz sos, sir, tunjevinna, luk, bijeli luk)	5 KM	6 KM
12. SICILIANA	(paradajz sos, sir, tunjevinna, sardele, svježe paradajz)	5 KM	6 KM
13. MINNELI	(paradajz sos, sir, juneta ĉunka, glijve, suŝuka, jaje)	6 KM	7 KM

BONFAREMO

NOVAJ PROJEKTOJ DE "ESPERO"

MEDICINA PROGRAMO

Subteno al Sandomo en Klokotnica

De post kiam fine de julio 2000.j. "Sant Quirze Solidari" el Katalunio kaj "Espero" subskribis ambician kontrakton pri "Ekipigo de Sandomo en Klokotnica", planante provizadon de diversa medicina ekipaĵo je valoro de pli ol 50000 eŭroj ĝis fino de 2005 oni komplete plenumis ĝin. La sumo donacita flanke de SQS atingis eĉ 53.000 eŭrojn.

Medicinaj aparatoj en 2001 - Klokotnica

La unuan donacon flanke de SQS "Espero" plenumis en januaro 2001, liverante al la Sandomo Klokotnica tri EKG apartojn. La aparatoj estas transdonitaj solene la 28-an de marto 2001. La solenaĵon ĉeestis reprezentantoj de la komunumo Doboj Oriento, etkomunumo Klokotnica, laboristoj de la Sandomo kaj civitanoj. Pri la ceremonio informis loka televido kaj gazetoj. Valoro de la projekto estis 8.000 eŭroj.

En septembro 2001 SQS anoncis duan parton de monhelpo al la Sandomo por medicina ekipaĵo kaj post konsultiĝoj kun estraro de la Sandomo kaj SQS ESPERO mendis diversajn medicinajn instrumentojn kaj ekipaĵon en suma valoro de 18.000 eŭroj. La firmao "Medicina" Sarajevo liveris spirometron kaj la firmao "Mediline" Sarajevo liveris la jenajn apartojn: du kompletoj por aborta kuretado, du kompletoj por vakua kuretado, urĝa vakua aspiratoro 2 pecoj, tri kompletoj por reanimado per oksigeno, sterilizatoro 4 pecoj, inhalilo 3 pecoj, kvin aparatoj por neniigo de medicinaj nadloj, negatoskopo 1 peco.

La dua donaco de la medicina ekipaĵo estas solene transdonita al la Sandomo en Klokotnica la 22-an de decembro 2001 kompreneble kun ĉeesto de komunumaj kaj etkomunumaj funkciuloj kaj civitanoj. Informis pri la afero lokaj radio kaj televido kaj ŝtatnivela gazeto.



ESPERO estas humanitara, bonfara organizo fondita en 1997 de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino kun la celo helpi homojn en stato de bezonego aŭ mizero precipe dum naturaj kaj sociaj katastrofoj.

ESPERO ĝis nun realigis multajn projektojn el kiu plej gravaj estas:

- (re)konstruado de hospitalo en urbo Teŝanj170.000 eŭroj
- konstrudo de akvodukta sistemo en Klokotnica110.000eŭroj
- helpo al rifuĝintoj de Kosovo en Bosnio10.000 eŭroj
- medicinaj aparatoj por sandomo en Doboj Oriento 25.000 eŭroj

En majo 1998 estas fondita en Sabadell ĝemela organizo "Espero"-Katalunio. Ĝi kontrakte kunlaboras kun "Espero"-Bosnio faciligante kontaktojn kun katalunaj fondusoj pri solidareco. Momente ambaŭ organizoj komune konkursis ĉe pluraj katalunaj fondusoj pri ses humanitaraj rekonstruaj projektoj en Bosnio.

Centra hejtado en 2002 - Staniĉ Rijeka

Por tria parto de la donaco "Espero" kun estraro de la Sandomo preparis komence de 2002 apartan projekton, kiu konsistis parte el instalado de centra hejtado en lokaj ambulatorioj kaj parte el provizo de medicina ekipaĵo por la Sandomo kaj la lokaj ambulatorioj en Doboj Oriento. La estraro de Sant Quirze Solidari aprobis la projekton en novembro 2002. La estraro de la Sandomo petis al ESPERO munti centran hejtadon en ambulatorio en vilaĝo Staniĉ Rijeka kaj kiam "Espero" pretigis ĝin

oni konstatis ke la saman domon uzas krom la ambulatorio ankaŭ kvarklasa bazlernejo. Kun aprobo de SQS, "Espero" instalas kompletan instalaĵon de centra hejtado por la bazlernejo kaj la ambulatorio. Ĉiuj laboroj estis finitaj je 03.02.2003 tiel ke la infanoj komencis lernojaron en varmigita lernoĉambroj, dum la malsanuloj povis normale uzi ambulatorian servon. Valoro de la donaco estis 6.000 eŭroj.

Vilaĝaj ambulatorioj 2003 -Lukavica Rijeka

Por resto de la tria donaco, 9.000 eŭroj "Espero" aĉetis medicinan ekipaĵon, pere de konkurso por la plej favora liveranto. La firmao "Medicina" Sarajevo liveris 5 kuŝejojn por kontrolo de malsanuloj, 2 ĉaretojn por instrumentoj, 3 ŝrankojn por kartoteko, 4 ŝrankojn por medikamentoj, 1 moveblan ĉareton por urĝa helpo, 2 EKG aparatojn, 1 negatoskopon.

La kvara parto de la donaco estis realigita fine de 2003 kaj ĝi konsistis el ekipigo de ambulatorio por familia sanprotekto en vilaĝo Lukavica Rijeka (konstruteknikaj laboroj kaj muntado de centra hejtado). Laboroj estis finitaj komence de 2004. Valoro de la donaco estis 10000 eŭroj, kaj por ankoraŭ 2000 eŭroj oni aĉetis plej bezonatan medicinan ekipaĵon por la Sandomo Klokotnica kaj kvin vilaĝaj ambulatorioj.

Tiamaniere, la Sandomo Klokotnica kaj la kvin lokaj ambulatorioj kiuj apartenas al la Sandomo kaj kiuj troviĝas en kvin etkomunumoj de la komunumo Doboj Oriento, grave modernigis propran aparataron, ebligante al la civitanoj ricevi unuagradan sanprotektan surloke, por ke ili ne devu veturi al la 50-kilometrojn malproksima urbo Tuzla. Aliaj humanitaraj organizoj liveris al la Sandomo en Klokotnica ultrasonan aparaton kaj spektrofotometron.

Lanĉita subteno al Maglaj

Kun sanprotekta oficejo de la komunumo Maglaj dum 2002 "Espero" movis projekton "Ekipigo de ambulatorio Novi Ŝeher" en vilaĝo



La flegistino kontentas pri la EKG aparato

Novi Ŝeher. Humanitara organizo "Sant Quirze Solidari" el Sant Quirze del Valles en Katalunio akceptis projekton en 2004, kiu estas realigita komence de 2005. En valoro de 5000 eŭroj "Espero" liveris sangopremo-metrojn, kuracistajn aŭskultilojn, otoskopojn, negatoskopojn, inhalatorojn, kuŝejojn por malsanuloj, seĝojn, ŝrankojn, tabulojn kaj vestohokojn.

La 3-an de julio 2005 rivero Bosna inundis centron de la urbo Maglaj kaj samtempe inundis keletaĝon de la Sandomo Maglaj, kie troviĝis grava medicina ekipaĵo. Post informigo pri la inundo flanke de "Espero", "Sant Quirze Solidari" decidis helpi al la Sandomo. Post konsultitigo kun estraro de la Sandomo, oni decidis pri livero de aparato "Medio multi" por kombinita fizikala terapio en valoro de 4000 eŭroj. "Espero" liveris la aparaton en majo 2006.



La rekonstruota rezervujo por akvo en Suho Polje

INFRASTRUKTURO

AKVODUKTO KLOKOTNICA FINITA, SUHO POLJE KOMENCITA

Solena funkciigo de "Akvodukta sistemo Klokotnica" okazis la 21-an de julio 2000. Per tiu ĉi solenaĵo Humanitara organizo "Espero" finis laboron kiu aŭris tri jarojn, komencita per konstruteknika idea projekto kaj finita per elektroprovizado de pumpilstacio "Kloteks". Dum tiu tempo oni faris jenajn aktivecojn:

- Ellaborigo de Idea konstruteknika projekto de la Akvodukta sistemo Klokotnica
- Finkonstruo de mankantaj partoj de akvoduktaj tuboj inter akvorezervujoj "Kloteks" kaj "Frkati" (ĉirkau 1 km)
- Finkonstruaj laboroj en akvorezervujo "Frkati" ($V=100\text{ m}^3$)
- Konstruigo de pumpilstacio "Kloteks"
- Muntado de pumpiloj en pumpilstacio "Kloteks"
- Elektroprovizaj laboroj en pumpilstacio "Kloteks" (600 m da dratlinio kun latismastoj, trafostacio, elektraĵoj)
- Akvodukta reto por vilaĝoj Brĝani, Habiboviĉi, Gnjeĉe, Frkati, Junuzoviĉi (ĉ. 4800 m da akvo-duktaĵo)

La realigon de la supraj agadoj ebligis monrimedoj de humanitara organizo "Sant Quirze Solidari" (komunumo Sant Quirze del Valles), Fons Catala (Barcelona), Diputado Barcelona, la komunumo Sabadell kaj donaco de akvoduktaj tuboj kaj pumpiloj de la akvoproviza entrepreno CASSA Sabadell. Entuta valoro de la donacitaj rimedoj por la Akvodukta sistemo Klokotnica ĝis fino de 2000 estis 90.000 eŭroj. Dum 2001 "Espero" preparis projekton pri konstruado de malŝarĝiga kamero

"Gnjeĉe", kiu plibonigus akvoprovizadon de pluraj vilaĝaj partoj. La Sant Quirze Solidari, komunumo Sabadell kaj entrepreno CASSA akceptis financi la projekton. "Espero" organizis konkurson kaj elektis plej favoran firmaon por realigo de la projekto – Hidroinst Klokotnica. La projekto estas realigita en tri fazoj dum 2002 kun du kontraktoj, la unua valoro 10.750 eŭroj (konstruteknikaj laboroj), la dua 2.100 eŭroj (parto de muntistaj laboroj). La tria fazo valoro 2.200 eŭroj por funkciigi malŝarĝigan kameron "Gnjeĉe" kaj ebligi akvoprovizadon en normala akvopremo estas finita en 2003. Dum 2004 Sabadell Solidari akceptis projekton pri akvolevado por etvilaĝo Hebiboviĉi (parto de la vilaĝo Klokotnica).

Oni betonis pumpilstacion kaj akvoduktan reton por akvoprovizado de la plej altaj domoj en la etvilaĝo. Por la unua donaco en 2004 en valoro de 2.500 eŭroj oni aĉetis pumpilojn kaj tubojn, kaj por la dua donaco en 2005 en valoro de 3.500 eŭroj oni konstruis subteran kameron kaj muntis pumpilojn kaj tubojn. Signifas do ke helpo al konstruado de la Akvosistemo Klokotnica pere de "Espero" pligrandiĝis al 110.000 eŭroj.

Akvodukto "Suho Polje"

En 2004 "Espero" movigis projekton "Akvodukto por vilaĝo Suho Polje". Vilaĝo Suho Polje troviĝas je 10 kilometroj de urbo Doboj sur maldekstra bordo de rivero Spreĉa (apuda vilaĝo Klokotnica troviĝas sur dekstra bordo de la sama rivero). La vilaĝo apartenas al ento Serba Respubliko. La loĝantaro de la vilaĝo konsistas el 900 serboj kaj 600 bosnoj. La bosna loĝantaro estis forpelita dum la milito, kaj nun ili preskaŭ ĉiuj revenis al propraj domoj. La vilaĝo troviĝis inter militilinoj kaj multaj domoj estas detruitaj. Multaj humanitaraj organizoj helpas al la loĝantaro reveni kaj rekonstrui la domojn.

Humanitara organizo "Sabadell Solidari" el urbo Sabadell, Katalunio, decidis helpi konstruadon de akvodukta sistemo Suho Polje. Por la jaro 2006 "Sabadell Solidari" aprobis en la unua fazo 6.000 eŭrojn, kiu realiĝis tra programo de "ESPERO".

Fetah Zvirac

BELETRO

MARKO VEŠOVIĆ

LA SARAJEVANO EL MONTENEGRO



Marko Vešović

Poeto de la sieĝita urbo

La poeto, rakontisto, romanisto, eseisto, tradukisto, publicisto, beletra kaj socia kritikisto – naskiĝis en la jaro 1945 en vilaĝo Pape, proksima al la urbeto Bijelo Polje en norda Montenegro, kiel li kleriĝis elemente kaj gimnazie. Poste la estontan verkiston Sarajevo, ĉefurbo de Bosnio kaj Hercegovino, akceptis kiel studenton en la Universitato kaj plue kiel sian konstantan loĝanton.

Dume li magistriĝis kaj doktoriĝis, fariĝante ankaŭ, speciale dum la lasta jardeko, unu el la plej famaj intelektuloj arde kritikanta la fifaman agresadon kontraŭ bosniaj lando kaj socio kiun dum preskaŭ kvar jaroj malkaŝe plenumadis la serbaj, montenegraj kaj kroataj nazioj kaj kiun ignoris kaj tiel subtenis t.n. internacia komunumo.

Kun la sarajevanoj la tuta familio Vešović trasuferis kvardekkvarmonatan sieĝadon de serboj kontraŭ la urbo. La poeto mem konfesas, ke li sukcesis ekkoni la mondon, en ĝi la homon kaj mem

estiĝi vera, pli kompleta homo—ĝuste kaj apenaŭ dum tiuj turmentoj.

Ĝis fino de 2002 Vešović publikigis dek librojn kaj en diversaj gazetoj miriadon da beletraĵoj, artikoloj, kritikoj, polemikoj kaj pamfletoj. Por niaj legantoj mi elektis kaj Esperantigis du versaĵojn el la bona tradicia poemaro *Reĝo kaj eluzito* kaj, ankaŭ, kelkajn ekstergenrajn prozopoetajn skizojn el la nove aperinta netipa libro *Pola kavalerio*, plenigita per siaspeca prozigita kaj dramigita poezio. La titolo rilatas al mencio de tiu tragika trupo en la skizo FRAGMENTOJ EL LETERO DE TRIFUN, kie la aŭtoro ĝian sturmadon **per lancoj** kontraŭ tankoj de Hitler komparas kun la batalado de **senarmitaj** bosni-hercegovinaj patriotoj kontraŭ la troarmitaj najbaroj malamikaj.

Nu, kiom ajn Marko Vešović estus la modesta kaj senĝena homo, kiom kaj eĉ pli profunde li travivas kaj arde eksplikas en sia verkado la maljustaĵojn faritajn kaj retenatajn kontraŭ la bosnianoj, speciale kontraŭ la bosnoj muslimaj. Koncerne tiaĵojn li deklaris intervjuo al la revuo *Dani*: “... ĉi tiu milito kun la infanaĝo estas esenca spertaĵo de mia vivo. Tial neniu ĉesigos min pripensadi ĝin kaj notadi la rezultojn.” “La silentado egaligas la viktimon kun ties ekzekutinto, kaj se ni konsentus muti, mi kraĉus sur mian plej penigan kaj plej karan spertaĵon.”

Jes, ĝuste tial ni lastatempe ricevis la potencan kriegon kontraŭ la krimeguloj kaj la milito ĝenerale – en belarta vesto. Ĝi apartenas al la Eliot-eske komprenataj verkoj altvaloraj ŝanĝantaj la tradician valorsistemon. En *Pola kavalerio* efektiviĝas la Browing-a “dokumenta subjekto lirika”, tamen malneŭtrala kaj riĉiĝinta per aktiva humanema sinteno de la poeto. Lia Mio transformiĝas ĉi-kaze en la medion, tra kiu realiĝas alies konfesaĵoj. Precipe per la (mal)rekta virina, patrineska voĉo ties parolado komplete detruas la politikan kaj ideologian dimensiojn de la historio.

Branko Miljko

*El la poemaro
Reĝo kaj eluzito*

La somernokta revo

Al Gordana

Surtable, malpli klare solas

*Pano, foreste ridetanta.
Kaj en la spaco Ter' pendolas
Je grila ĉirpo hokpendanta.*

*Ĉio ŝvebiĝis, krepuske spiton
Montras la mebloj al pez-efektoj.
Kvazaŭ fortrinkus, tutan, graviton
Kataj okuloj el la objektoj.*

*Jen mia koro, ol kerno
Pli dura, lasas trans la limo
Nek morton, nek vivon.
Sed, el ĝi tia, sparkas rimo*

Meze de l' printempo

En angioj ĉies la oro plaŭdas

*Porte singultigan lazuron.
Nur idiotoj kaj infanoj aŭdas
De “Granda Ŭrsino” murmuron.*

*Birdo plektiĝis en ŝafan felon,
Enbuŝe: dolĉas demandiĝo.
Maria plenmelkis grandan sitelon
Ne da lakto, sed da tagiĝo.*

*Kaj verm' en trabo, kaj muso en
muro
Vojojn al Dio sennombre konas.
Mi scias ankaŭ ĉar paŝoj sonas:
Kien kondukas proksimula spuro.*

*Eĉ muŝetoj volus esti festanoj.
En herbejo vivobola.*

El la poemaro *Pola kavalerio*

La senmorta momento

Kontraŭ la transiro strata
optopafisto.
Du junulinoj, spiregantaj pro la
transkurado.
El ili varmegas, belodore, kiel el
tolaĵo,
Silka, kiun oni gladas. Ĉe unu, ne
frizaĵo,
Sed la hirta kristnaska greno.
Ŝi krakas, furiozas kaj sakras
Kontraŭ la optopafisto: ŝajnas ke
tra l' fenestro
Ĉarman tempeston mi rigardas!
Alies vortoj agrablaj
Kiel flirtado de l' ombrelo, matene,
sur plaĝo en Budva.
Per skuo ŝi, sporade, retroĵetas la
harojn. Pro ni!
Ĉar ĉi scias: kiam ajn ŝi ilin
retroĵetas, la longaj haroj
Belodoros. La belulino. Sed el tiuj
kiuj neniam
Forgesas al vi ravrideti. Kaj lukse
kaj avare.
Sufiĉe lukse por feliĉigi vin. Sufiĉe
avare por kosti ilin neniom.
Rideto ties informas vin, ke ne por
ili vi estas objekto inter objektoj.
Eblas eĉ, ke ili volus malsorĉi vin,
Se l' frosta rigardo virina jam
objektigis vin.
En al aero ekodoris intense je mia
delonge pasinta juneco,
Kiam ĉiu aleo kondukis ĝis la
mond-ekstremo.
Kiam la vivo ankoraŭ estis ne
banala kiel la proverbo.
Ili foriris kaj en mi restigis la
delicon,
Kian oni trasentas longe
rigardante en la firmamenton,
Kie la neĝeroj svarmas.
Foriris, gajbruarte ne du knabinoj,
Sed du zefiroj blovetintaj subite
Tra premvarmego de la sieĝo. Tra
l' somermeza premvarmego de l'
ekzistado.

**Kiam serba optopafisto al mia
amikino**

pafmurdis infanon en la brakoj,
mi ĉesis Dion kredi. Malestas vi,
Dio,
mi diris, vi trastrekiĝis por ĉiam,
kaj fino. Dio permesanta infanojn,
en sinoj
de l' patrinoj mortigadi tiel, pro
nenio,
do eĉ por amuziĝi, ne Tian Dion
mi bezonas,
Sed la aliaj – volu kion ajn.

Alie, antaŭ la milito mi opiniis,
Ke la firmamento sur min falegus,
se mi ĉesus
Dion kredi.
Sed jen, okazis nenio, eĉ ne tegolo
krevetis en tegmento de mia
domo.
Mi estas plu mi. Sarajevo plu
Sarajevo.
La firmamento plu firmamento. Kaj
jen ĝi situas kiel antaŭe,
Kvankam Dio malestas. Mi pensas,
ĝi malestas por mi,
Sed por la aliaj - laŭvole.
Ĉio ruliĝas malnove,
Eĉ al mi ŝajnas, ke ĉi tiel
plifacilas. Ĉi tiel,
Sen Dio. Timinde mi ne povas
klarigi tion:
Vi scias, oni piediras malpli pene
sen io en la manoj.
Ol portaĉante mansakojn. Nu jes,
bone mi diris,
Sen Dio oni iel pli facile marŝas
Tra jena ĝiba vivo. Sole,
ĉiumomente mi sentas,
Ke miaj manoj malplenas.

La tagiĝo

Mi staras postene. Aŭroras.
Proksimas domo. Fakte,
flaveta barako. Ĉe ĝi – piramidalo
super puto.
La piramidalo altas, ial al mi
ŝajnas, samkiom
la puto profundas. Super la domo
blanka fumo malvolviĝas
Kiel la infana vindilo.

En la domo ploras infano. Longe.
Jam plurajn jarojn.
Al mi ŝajnas la budo renversiĝus se
l' infano ekmutus.
Ja ĉio ajn enpensiĝas
Dum oni staras postene.

Subite, el la domo aperas
knabineto orkapa,
Proksimume dek -, pleje dekdujara.
Sen kruro. Ĉarmega invalidino.
Anĝelete sur irilo.
Dum ŝia vizaĝo brilas ruĝe.
Kvazaŭ de l' tagiĝo.
Kaj mi eklarmas. Pro la
ruĝbrilo sur ŝia vizaĝo.
Pro tiu aŭroro sur irilo! Ĉio ajn
Povas ja onin obsedi
Dum oni staras postene.

Dume la infanploro ne estingiĝas.
Kvazaŭ ĝi havus
Elektran motoron apartan. La
ploro, kiu ŝajne,
Intencas ne halti, ĉiam dum daŭras
la mondo.
Dum iu animo vivas sub jena
firmamento. La ploro
Tra ĉiuj eternecoj sonegonta. Ĉar
la tempo, postena,
Estadas lanta kiel la glaciejo.
Postenante la animo, iam
Aŭdas la hufbrudadon desub
heroldoj portantaj la informon, ke,
sub la firmamento,
Delonge malestas ĉio. Eĉ vi. La
postenanta.



La kaftaseto

Kiam Azra/n kaj ŝiajn familianojn grenado ĉe l' tagmanĝo dispecigis, unue – mi neniumis! Ĉu mi tiom ligniĝis, ĉu mian koron ĉirkaŭas glacio centkrusta, ĉu nenio plu povas min eksciti! Kvazaŭ la grenadoj estus murdintaj en mi animon! La korpo, plu tuta, sed kie estas mia animo?

Trioble pli grave mi suferis, kiam ĵus antaŭ la milito mortis Ruĵa. Ŝi estis fleginta nian koleginon, kiu pro kancero mortadis terure turmentata. Ŝi flegis ŝin – kiu scius la kialon. Ruĵa kun ŝi rilatis ne pli intime ol ni ceteraj. Sed jen, ŝi foruzis monatojn da vivo por malpliigi ŝian suferadon. Ŝi foruzis ilin – kvazaŭ nenial. Poste ankaŭ Ruĵa malsaniĝis. Ĉu vi, Dio, do malatentis la eraron en viaj kajeroj? – Ekpensis mi ja Ruĵa ankaŭ eksuferis je kancero. Sed post morto de Azra, unue – mi neniumis. Interne detruaĵo kvazaŭ mian animon “Blankaj agloj”^{*} travadis rabante. Sed, dum la tempo pasadis ekis doloreto. Negrave kaj senĉese. Ĉiun tagon ja pli intense. Kion ajn mi laboris, pri kio ajn mi pensis, tra tio eksponiĝis la pereco de Azra.

Foje en Miskin-strato, mi konatiĝis kun viro kiu elprenadis Azra/n el la ruinaĵo,

elfosadis ŝin kaj la familianojn el tiu ruino. Li ne ĉesas, liadire, plori, de post kiam li vidis tion. **Ne ĉi tiu mondo ne honoras al Dio, sinjorino,** li diras. Ili, sinjorino, ne estas l' ebriaj, sed la ekstraj fakuloj. Sian metion ili trejnigis dum la tuta vivo. Nun ili montras kontraŭ ni – kiom ili finlernis. Ĉe ĉiu kanono, sinjorino, estas klera oficiro, scianta perfekte, ke l' grenadoj ne mortigas sed buĉas. Ili nur ne scias – kiun. **Kaj tio estas sola diferenco inter nunaj kaj tiuj antaŭaj ĉetnikoj, la serbaj nazioj.**

He, tie ankaŭ mi traŝtopiĝis. Kaj mi ploregis ĝis la hejmo. Mi konfesas estis dolĉe: vi ne ferigis, sinjorino Nermana el Tito-strato, en vi plu estas animo, almenaŭ ete! Kaj plurajn horojn ne ĉesis flui miaj larmoj. Kvazaŭ nenial. Pro si mem. Mi elverŝis tutan rivereton da larmoj – por ĉio nepriplorita. Mi ordigas la ĉambrojn, gladas ĉemizon de Mustafa, kuiras fazeolojn, la larmoj dume ne ĉesas. Surprize estis iom da kafo en la domo. Mi kuiris grandan potaĉon: kial mi ĝin ŝparu, eblas ĝin eĉ ne fintrinki; grenado povas dum la trinkado enflugi la kafkruĉon. Mi eltrinkas la kafon, dum larmoj miaj gutas en la taseton.

Mi simulas ekzisti

Ĉe l' komenciĝo, mi opiniis la aferojn simplaj: ĉu mortiĝi ĉu resti viva. Sed desupre estas destinitaj ambaŭ. Kiu povintus pensi, ke ni estas - ne supre juĝataj, sed malsupre kondamnitaj. Precipe oni ne povis scii, ke oni sian sangon trinkos. Sed plu, se ni eĉ tion povintus imagi, ĉu mi povis sonĝi, ke la plej bona amiko – kun kiu mi, dudek jarojn, nian tablon en kafejo havis – devigos min manĝi per kulero mian sangon kiel supon. Do ĉiuj sciis: tiu tablo estas nur nia. Mi pensas, pri la tagoj kiam ni estis sidontaj ĉe ĝi, ne aliaj rajtis

Nu tio estas, li diras, via fatalo, nenio nun fareblas. Pli bone mi vin mortigu ol vi min, ĉu ne? Via Alija^{**} estis planinta, li diras, ke vi la samon kontraŭ ni faru. Kaj ni vin, bedaŭrinde, superrapidis.

Sed se estus nur tio! Kiu povintus sonĝi, ke la plej bona amiko unue min batados, ĝis ĉiuj plomboj el mia buŝo elfalu, poste – bajoneton direktos kontraŭ mian bruston. Ĉi tie. Kaj la alian kontraŭ la dorson. Ĉi tie. Kaj li ordonas al mi stari, plurhore sur unu piedo: se mi renversiĝus kaj surpikiĝus kontraŭ unu el bajonetoj – mem falinta, min mem murdinta. Ĉu ankaŭ la jenon Alija planis, demandis mi. Kaj li – per ŝuego kontraŭ la renojn: silentu, fie por via patrino turka^{***}!

Ĉe la komenciĝo mi pensis pri mi: ĉu morti, ĉu resti viva. Ne tiam mi sciis ke oni efektive povas morti kaj transvivi. Kvazaŭ mi paŝas kaj rigardas kaj manĝas kaj parolas post mia sepulto. Mi simulas vivi. Mi simulas ekzisti.

Vespere vi enlitiĝas

dume scianta, ke vi vane enlitiĝas: morgaŭ vi levigos pli elturmentita ol kuŝiĝinte. Matene vi ellitiĝas dume scianta, ke vane vi ellitiĝas: vin atendas la hieraŭa tago kun hieraŭaj psikpremoj. Kun antaŭhieraŭaj humiligoj. Kun la malespero deantaŭ tri tagoj. Jena sieĝo daŭras ne du jarojn sed unu (sep)tagon, kies finiĝo mankas.

Al mi ŝajnas ke de jenaĵo povus min ripozigi nur la maro. Sed kiu scias, ĉu mi vidos ĝin iam plu? Ĉu mi iam plu stariĝos sur la rokojn, kie la aerfludo tiom intensas, ke la ĵetita ĉapo revenas al vi.

Sed mi sopiras ĉi-foje ne la maron kun karnoriĉaj folioj de l' agavo, en kiujn estas nomoj Amaj gravuritaj. Ne la olivarbojn plurfleksiĝintajn Spasme kvazaŭ verdaj Laokonoj. Ne la meduzbobelojn similantaj al la silka tendaro el fabeloj orientanaj. Mi sopiras ne gracion monotonion de l' ondarono kiun poeto komparas kun metriko Homera. Mi sopiras ne tiun tinton, per kiu eblas skribi miliardojn kaj miliardojn da Iliadoj kaj Odiseadoj. Mi sopiras tiun melankolion, per kiu oni obsediĝas enrigardinta la eternan lazuron kaj enaŭskultinta la murmuron de tiu eternaĵo. La melankolion, diranta al vi, ke vi rehavas vian animon. Eble ne, la melankolion. Sed mi sopiras tiun belegan kaj sanfartigan vakuajon.

Mergi sian animon en la vakuon, kiu ripozigas. Kuracas.

Junigas. Plurhore gapi nek en la marvastajon, nek super la marvastajon, sed kvazaŭ nenien! Laŭbosne. Ĉiam ĝis vi forgesu: kaj kio, kaj kie kaj de kie vi estas kaj kiel vi nomiĝas. Vi scias nur, ke en vi estas majloj kaj majloj da vakuajon. Kaj ke la marspaco el vi forŝuĉis jarcentojn ĉiujn, ĝis Adamo. La lazura vakuajon disetendiĝas ĝis fino de l' mondo kaj, malantaŭen, ĝis ties komenciĝo. Kaj vi komprenetas. Sed kiel – komprenetas?! Vi sentas sur la palato: kia bonfarto ekregos post Juĝotago! Ĉio forviŝiĝos, kiel desur la lerneja tabulo infana skribaĉo.

Kaj pura plezuro restos! Kaj vi gustumas anticipe, almenaŭ per kafkulero, la beataĵon en kiun eksplodos la mondo!

Marko Vešović

* Blankaj agloj – serbaj murdistaj trupoj

** Alija Izetbegović – tiam prezidento de Bosnio kaj Hercegovino.

*** moknomo de bosnaj muslimoj.

NEKROLOGO

MUHAMED TURAN

Estis somero de la jaro 2003. Mi sidis kun mia amiko Muhamed en ĝardeno de hotelo Palas en Banja Luka kaj interparolis pri multaj temoj. Li sciigis min pri siaj sanaj problemoj kaj mallonge eldiris "eble ke mi malfruis". De tiu momento mi, de tempo al tempo, povis atesti pri lia persista batalo por sia vivo. Mi ekkonis Muhamed en la jaro 1976, kiam ni kun aliaj amikoj de Esperanto en Banja Luka entuziasme laboris por fondi klubojn kaj aktive partopreni en



Muhamed Turan (1954 - 2004)

la E-vivo. Estas tre longa listo de aranĝoj kiujn ni kune partoprenis aŭ organizis. En Banja Luka ni organizis la 5-an Unuamajan renkontiĝon, du laborbrigadojn, someran esperantan lernejon, aŭtunan konsiliĝon, multdekojn da kursojn de la lingvo kaj en la jaro 1987 la 22-an Kongreson de Jugoslavia Esperanto Ligo. Multe kaj ofte ni vojaĝis por partopreni E-aranĝojn en Bosnio kaj Hercegovino kaj en aliaj respublikoj de tiama Jugoslavio kaj ankaŭ en eksterlando. En memoroj de ĉiuj liaj kunvojaĝantoj li restis kiel tre gaja, vigla kaj societema homo. Homo ĉiam preta por ŝerci, kanti aŭ danci. Muhamed aktive laboris ankaŭ en kulturarta societo en Vrbanja (parto de urbo Banja Luka) kaj verŝajne pro tio li estis kapabla kanti senĉese kaj senlace dum la tuta vojaĝo. Post kiam ni fondis Komunuman organizon de Esperanto-Junularo en Banja Luka ni gvidis tutan E-vivon en Banja Luka edukante multajn generaciojn de junaj banjalukaj geesperantistoj. Li ĉiam partoprenis niajn regulajn kunvenojn jaŭde. Ankaŭ li aktive laboris post edziniĝo al Mira (ankaŭ esperantistino). La tutan kontraŭbosnian militon Muhamed kun siaj familianoj (edzino

Mira, filinoj Belma kaj Maja) travivis en Banja Luka en tre malfacilaj cirkostancoj. Li estis maldungita de lia posteno, li ne povis libere iri, labori ..., simple li ne povis normale vivi en sia urbo. Kiam proksimiĝis fino de la milito serbaj fortoj mobilizis lin (kun multaj aliaj viroj el Banja Luka) por fosi tranĉeojn aŭ servi kiel vivanta ŝildo. Muhamed sukcesis savi sian vivon kaj reveni al sia familio. Post la milito li multe laboris por ke nia socio revenu al normala vivo. Li helpis al multaj banjalukanoj ke ili denove posedu siajn domojn kaj aliajn havaĵojn, vojaĝis tra la mondo (Usono, Svedio, Germanio ...) por viziti siajn ekzilitajn parencojn, geamikojn, denove kunligigis homojn, ĉar li opiniis ke en Bosnio kaj Hercegovino oni denove devas normale vivi. La plej grava kondiĉo por tio estas reveno de loĝantaroj al siaj antaŭmilitaj loĝlokoj.

Post la milito li dum kelkaj jaroj laboris ĉe SFOR (internaciaj militaj fortoj) kiel meblofaristo kaj tiamaniere sekurigis normalan vivon de sia familio.

Ankaŭ li aktive partoprenis en postmilitaj aranĝoj de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino.

Estis vendredo kiam mi lastan fojon vizitis lin du tagojn antaŭ lia morto. Li sukcesis eldiri nur kelkajn vortojn. Dimanĉon revenante al Sarajevo eksonoris mia poŝtelefono kaj sur ĝi mi legis nomon Duško (nia kuna amiko), tuj mi sciis kio okazis. Duško sciigis min ke Muhamed mortis.

Muhamed mortis pro karcinomo. Spite al tiu malfacila malsano li tre kuraĝe kaj memkonscie gvidis batalon por sia sano. Ĉiam li bone sciis kiu estas sekvonta paŝo de lia batalo. Neniam oni povis vidi signojn de doloroj sur lia vizaĝo, li stoike suferis sian faton.

Por homoj kiuj intense vivis kun li, unuavice por liaj familianoj, patro kaj gefratoj, la geamikoj restas granda malpleno.

Esperanto-movado en Bosnio kaj Hercegovino, precipe ĝia parto en Banja Luka, perdis tre gravan aktivulon.

Muhamed estas entombigita la 15 - an de decembro 2004 en Banja Luka.

Kemal Jakupović

Antikva bosnia mono

La unua mono kiun forĝis loĝantaro sur teritorio de la nuna Bosnio kaj Hercegovino devenas el la tria jarcento de malnova epoko, t.e. de pli ol 2.000 jaroj. Ĝin forĝis ilira gento Daorsi, kiu koloniis ĉirkaŭaĵon de nuna urbo Stolac. Post roma konkero de Bosnio oni uzis roman monon. Mezepoka bosnia mono, nomata *dinaro*, ricevis sian nomon laŭ la roma *denaro*.

Ormonero de reĝo Tvrtko



La plej valora kaj la plej bela ekzemplero de bosnia mezepoka ormonero (dukato) estas tiu fama de reĝo Tvrtko I, forĝita en 1377. Pro sia grandeco (diametro 30 mm), pezo (14,05 gramoj), dika (1 mm) kaj pro arta beleco ĝi preskaŭ surpintiĝis eŭropan mezepokan numismatikon. Pasis longa tempo de kiam en faka literaturo ĝi ricevis epiteton de arta majstroverko.

Ĝia reala valoro estis pro tio ke ĝi kvaroble valoris pli ol aliaj ormoneroj de aliaj landoj. Ekzemple Venecia kaj Hungara ormonero pezis 3,559 gramojn diference de Bosnia kiu pezis eĉ 14,05 gramojn. Pro sia alta pureco (980/1000) kaj dikeco de (1 mm), ĝi estis tre serĉata, kaj pasis mallonga tempo de ĝia elforĝiĝo ĝis la momento kiam ĝi estis simple disvendita. Pro tio ekzempleroj de tiu ormonero hodiaŭ estas tre maloftaj.

Sur ĝia antaŭa flanko estas bosnia ŝtata blazono kun ses lilioj. Sur dorsa flanko oni vidas prancitan leonon. Ambaŭflanke ekzistas latinaj surskriboj. Sur anataŭa flanko skribas: MONETA AUREA REGIS STEPHANI (ornumero de reĝo Stjepan (Tvrtko) kaj sur dorsa flanko: GLORIA TIBI DEUS SPES NOSTRA (Gloro al vi Dio, nia espero). Ĝis la nuna tempo oni konservis nur unu ekzempleron de tiu ormonero kaj ĝi troviĝas en Zagrebo.

prof. Enver Imamović

t.rim
8KM
PRETPLATA
+30
SMS MJESEČNO

t.trendi
+30min
RAZGOVORA
+60
SMS MJESEČNO

t.trijumf
+60min
RAZGOVORA
+90
SMS MJESEČNO



NOVA PONUDA USLUGA - UŽITAK U KOMUNICIRANJU !

- niže cijene saobraćaja za sve korisnike,
- jedinstvena cijena poziva prema svim fiksnim mrežama u BiH za sve korisnike,
- niža cijena priključka, i brojne druge pogodnosti!

Informacije: besplatni info telefon 1444. Sekunda razgovora je sekunda na BH MOBILE računu!

www.bhtelecom.ba

bh

bhmobile 